

# La Espero

1975-6

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

## POLLANDO HODIAŬ



Dimanĉe la 31 aŭg. mi eniris la LOT-aeroplanon en Kopenhago por Varsovio. Mi denove gajnis 10-tagan rondvojaĝon tra Pollando en konkurso de Pola Radio. La temo de la konkurso estis skribi kelkajn pensojn kunlige al la 30-a datreveno de la venko super la faŝismo kaj la finiĝo de la dua mondmilito. Estis 4 diversaj konkursoj dum la jaro kaj mi speciale ĝojas, ke mi gajnis ĝuste tiun konkurson, ĉar tiu venko estas tre grava ankaŭ por ni esperantistoj. Tion oni facile konstatas, studante la esperantan historion. Dum la vizito en Auschwitz, ni ricevis rektan memorbildon pri tio kio okazis meze en Eŭropo antaŭ nur 30 jaroj. Tiam mi pripensis, ke mi aŭdis, ke ankaŭ Lidia Zamenhof estis mortigita en iu koncentrejo, sed mi ne memoras kie. Ĉu eble troviĝas ŝia hararo ie en la hararamasegoj, kiuj kune kun diversaj postlasitaj objektoj akuzas nin postvivantojn en la nomo de pluraj milionoj da murditaj homoj; akuzas nin pro pasiveco kaj silento, sed ankaŭ admonas nin zorgi pri tio, ke ne denove povu okazi io simila.

Eble tiu estis por mi unu el la plej impresaj vizitoj dum la rondvojaĝo. Sed vere estis memorinda vojaĝo ankaŭ pro pluraj aliaj kaŭzoj. Ni estis grupo de 40 personoj el 18 landoj. Malgraŭ ke la lingvaj problemoj donis malavantaĝojn regis en la grupo amikeco kaj bonhumoro. Ni veturis per aŭtobuso laŭ la vojo Varsovio — Rzeszow — Bieszczady — Nowy Sacz — Krakovo — Katowice — Varsovio. Ni traveturis pejzaĝon tre

varian, urbojn, kulturitajn kamparojn kaj montaron. Ĉie oni konstruas, ni vidis amasojn da duonpretigitaj domoj laŭ la vojo. Ni ankaŭ konstatis, ke la "civilizo" regas eĉ en Pollando. La pruvo estas la altaj fabrikotuboj, kiuj elvomas densan fumon.

Ni havis tre "plenan" programon. Sed la vojaĝoficejo "Orbis" bone zorgis pri nia bonfarto per loĝigo en tre belaj, komfortaj hoteloj kaj per tre abunda kaj bongusta manĝo. Ni vizitis la belajn kastelojn Willanow ekster Varsovio, Lancut ĉe Rzeszow kaj Wavel en Krakovo, ni vizitis la ŝtalkombinaton Nowa Huta, la plej granda industrio en Pollando, kaj la karbminejon Jan. En la salminejo en Wieliczka ni admiris la belajn subterajn salonojn, kiujn ornamis diversaj ministoj per belege faritaj monumentoj el "verda" salo. Eĉ estis lumkronoj el kristala salo. Oni uzas parton de la minejo ankaŭ kiel sanatorion, ĉar oni opinias, ke la aero tie estas saniga. Kelkajn horojn ni pasigis flosante sur la rivero Donajec, kiu

eflas limrivero al Ĉeĥoslovakio. Ni faris viziton al la konata Universitato Jagellonica en Krakovo kaj havis ankaŭ okazon vidi ŝtatan bienon, kie oni kulturas amasojn da floroj. Ekster Varsovio situas la eta loko Zelazowa Wola, la naskiĝloko de Chopin. En lia naskiĝdomo ni aŭskultis pianokoncerton de Marta Gozdecka.

Kompreneble ni ankaŭ vizitis la Polan Radion, kie mi kun ĝojo konatigis al la "voĉoj" el la esperantoelsendoj. Mi eĉ havis okazon persone danki la direktoron de la Pola Radio pro la esperantoelsendoj kaj speciale pro la vespera duonhoro, dum kiu tempo mi ordinare aŭskultas.

La rondveturojn en la grandurboj Varsovio kaj Krakovo mi ankaŭ volas mencii. Speciale interese estis studi la konstruaĵojn en Varsovio. Dum la milito la urbo ja estis tute detruita. Vagante laŭ la stratoj oni havas la impreson, ke la konstruaĵoj estas tre malnovaj, kaj ne nur 20—30-jaraj. Oni do konservis la malnovan stilon je la rekonstruado.

Tiu vojaĝo estis por mi interesa ankaŭ el alia vidpunkto. Por la unua fojo mi havis eblecon partopreni aranĝon ekster la "esperantomondo" kun tiom da nacioj reprezentitaj. Mi nun povis praktike observi kiel funkcias la ordinara internaciaj aranĝoj kaj iliaj tradukmetodoj. La rezulto





## Redaktoro:

Movado sen idealismo devas morti! Tiun ŝokan aserton ni trovas en leteroj de unu samideano, kiu certe sitempe aktive laboris, kaj tio kion li celas estas la sveda esperantomovado.

La unua impresado devas esti, ke tiu samideano ne scias, pri kio li parolas. Malmultaj svedaj popolmovadoj enhavas tiom da idealismo kiom ĝuste la esperantomovado. Multaj aktivuloj ĉie en la lando ne nur senpage laboras, ne nur ofertas tempon kaj fortojn por nia movado, sed ili ankaŭ elspezas monon. Eĉ la anoj de la landa estraro, de la Eldona Societo kaj aliaj institucioj ne nur partoprenas la laboron kaj la kunsidojn sen ia rekompenco, ili ankaŭ ĝenerale pagas siajn vojaĝkostojn — ofte konsiderindaj — el propra kaso, kiam la kunsidoj okazas en lokoj ofte longe for de ilia hejmloko. Esti aktiva esperantisto en Svedujo hodiaŭ signifas ne nur oferi tempon kaj laboron, oni devas ankaŭ elspezi monon por la plezuro labori en nia movado.

Sed kiam oni pli atente legas la leteron, oni trovas, ke certe ne estas tio, kion celas nia amiko. Li tute ne volas kritiki tiujn kiuj laboras por esperanto, li direktas sin al tiuj, kiuj ne venas al niaj kunvenoj, kiuj procentoj da pretekstoj ne partoprenas. Kaj li speciale malĝojas, ĉar ne plu eblas aranĝi kunvenojn en sabatoj aŭ dimanĉoj, kiuj estas la solaj tagoj kiam li estas libera.

Nu, multaj kluboj fakte havas aranĝojn en sabatovesperoj kaj dimanĉoj: ekz. Malmö kaj Göteborg. Plurloke ankaŭ KELL. Sed oni ne forviŝu la aserton de nia amiko, kvankam li estas skaniano kaj certe havas eblecon viziti iun aranĝon en Malmö. Ĉar tio kion li volas preparoli estas tre grava afero; la manko de idealismo en nia socio mem, la emo de la homoj rigardi televidon kaj okupiĝi pri privataj aferoj kaj plezuroj anstataŭ dediĉi sin al la laboro por ideoj, kiuj celas plibonigi la mondon.

Sed tiu problemoj ne estas aparta por la esperantomovado. Ĝi estas problemoj por ĉiuj popolorganizaĵoj. La abstinenculoj, la kristanoj, eĉ la politikaj partioj suferas de la sama sinteno de la homoj. La ĉefa kaŭzo verŝajne estas la pli alta materia nivelo. En la tridekaj jaroj ne ekzistis televido — en mia familio ni eĉ ne posedis radioaparaton — malmultaj posedis aŭtojn, la homoj havis malmultan monon por elspezi por amuzajoj. Tiam oni kolektiĝis en la kunvenoj de la diversaj organizaĵoj, tiam oni trovis tie plezuron kaj agrablan ŝanĝon de la ĉiutaga monotoneco.

Oni povas bedaŭri, eble, ke tiu si-

tuacio ne plu estas. Sed respiri al tempoj pasintaj kaj plendi pri la moderna tempo ne multe utilas al ni. Ni devas akcepti, ke la socio mem ŝanĝiĝis. Kaj la evoluo neniam reiras al stadio jam pasinta. Povos sekvi pli malbonaj tempoj, ankaŭ nia alta vivnivelo povas malaltiĝi. Sed la tridekaj jaroj neniam revenos.

Tio estas fakto kion ni devas akcepti. La socio ne adaptiĝas al ni. Estas ni, kiuj devas adaptiĝi al la socio, al la evoluo. Por la esperantomovado la plej grava problemoj hodiaŭ estas — laŭ mia opinio — ke ni ne stagnu. Mi ne pensas unuavice pri la nombro de niaj membroj. Sed ni ne devas fiksiĝi al malnovaj labormetodoj, kiuj donis bonajn rezultojn en la tridekaj jaroj, sed kiuj ne konvenas en la socio de 1975. Ni devas tiel agi, ke ni apelaciu al la nuntempaj homoj, kaj ni devas konscii, ke tiuj homoj estas aliaj ol tiuj, kiuj vivis antaŭ la milito.

Tio estas afero, kiun devas pripensi la estraro de UEA, la estraro de SEF kaj vi ĉiuj, kiuj laboras surloke. Agrablajn festotagojn kaj feliĉan novan jaron 1976 al vi!

*Anders Blomberg*

### POLLANDO (daŭr.)

estis ofte kaosa kaj tio ne dependas de malbonaj tradukistoj. Male! Ĉiuj estis spertaj. De Pola Radio aŭ de Orbis akompanis la grupon tradukistoj de la franca, germana, angla, hispana kaj rusa lingvoj. En la komenco mi provis sekvi la anglan tradukon, sed konstatis, ke mi pli bone komprenas la germanan. Ofte tamen estis samtempa tradukado al ĉiuj kvin lingvoj, estis susuro da voĉoj el ĉiuj anguloj, tiam almenaŭ mi komprenis nenion. Tial estis ekz. la vizito al la Jagellonica Universitato preskaŭ sensignifa por mi. Sed dum la vizitoj al la salminejo kaj al Auschwitz mi bone povis sekvi la rakontadon, ĉar tiam lokaj esperantistoj funkciis kiel tradukantoj. Mi konstatis, ke mi povis paroli kun 6 personoj: 2 svedoj, norvego, dano kaj 2 finnaj esperantistoj, kiuj feliĉe estis en la grupo. (Ni fakte faris bonan propagandon por esperanto nur praktike uzante ĝin. Oni rimarkis kiel facile ni povas babili.) Kun diversaj aliaj personoj mi povis balbuti en angla aŭ germana lingvoj, kun la ceteraj mi devis uzi nur signojn. Ekzemple, mi loĝis du noktojn en Varsovio kune kun hispanino el Burgos! Kiel terure estas kiam oni ne povas interparoli. Mi ankaŭ konstatis, ke la grupo aŭtomate dividiĝas en malgrandajn grupojn laŭ lingvaj bariloj. En la esperantaj aranĝoj mi alkutimiĝis paroli kun kiu ajn, kaj vere paroli, ne nur balbuti.

Per tiu eta raporto mi provis doni imagon pri la vojaĝo. Multo restas

diri, sed pli bone vi mem aŭskultu la elsendojn de Pola Radio kaj partoprenu la konkursojn. Tiam vi eble havos saman bonŝancon kiel mi kaj povos mem sperti la bonan atmosferon de simila vojaĝo. Guste nun estas konkurso pri LOT. Sed mi petas vin, ne forgesu skribi al la esperantoredakcio pri viaj opinioj pri la programoj. Estas tre grave por la redakcia laboro, ke oni povas "mezuri" la reagojn de la aŭskultantoj per multnombraj kartoj aŭ leteroj. Tio validas kompreneble ne nur por Varsovio, sed por ĉiuj stacioj, kiuj sendas en esperanto. Viaj kartoj estas tre valoraj por ilia laboro kaj ilia laboro estas tre valora por la esperantomovado, ĉu ne?

Märtha

## HÖG TID



**att betala  
avgiften till UEA**

**DU KAN**

hjelpa UEA ekonomiskt genom medlemskap.

Avgifter:

80 kr för årsbok och månadstidskriften ESPERANTO.

240 kr för stödjande medlem.

**Betala nu för 1976  
Postgiro 14 74 29-5**

**SVENSKA  
ESPERANTOFÖRBUNDET**



# Pac- konferenco

Raporto pri "Pactagoj" en Stokholmo  
inter la 23a kaj 25a de majo -75

En majo ĉijare pasis jam 30 jaroj post la fino de la dua mondmilito, kiu signifis definitivan malvenkon de la naziismo kaj finfinan liberigon por milionoj da homoj en Eŭropo.

Pasis ankaŭ 25 jaroj post lanĉo de la t. n. Apelacio de Stokholmo kontraŭ nukleaj armiloj. Ĉi tiu manifestiĝo de pacemo kolektis siatepe pli ol 500 milionojn da subskriboj.

Tiuj ĉi du jubileoj ludis gravan rolon en la programo de la t. n. Pactagoj, kiujn organizis la Sveda Packomitato inter la 23a kaj 25a de majo 1975 en Stokholmo. Kunvenis ĉirkaŭ 200 delegitoj el ĉiuj ŝtatoj ĉirkaŭ la Balta Maro kaj el Islando kaj Norvegio. Kiel observanto ĉeestis ankaŭ la sekretario de SEF.

Vendredvespere okazis ampleksa festa programo en la Civitana Domo. Bonvensalutis la guberniestro Hjalmar Mehr kaj la prezidanto de la Sveda Packomitato. Dro Stellan Arvidsson. Unuarangaj artistoj el la reprezentitaj landoj prezentis kant kaj muzikprogramon. La plej diversaj gustoj ricevis sian parton far' de i. a. popmuzika grupo el Pollando, litovaj operkantistinoj, politikaj kantgrupoj el Finnlando kaj Svedio, koncertviolonisto el Estonio kaj pluraj trubaduroj svedaj.

La pli serioza parto de la programo komenciĝis sabatmatene en la Popola Domo kun diversaj enkondukaj prelegoj. Parolis i. a. ministeria sekretario Lennart Lindgren (sveda ministerio pri agrikulturo) pri la kunlaboro rilate mediprizorgon ĉirkaŭ kaj en la Balta Maro.

Okazis ankaŭ komisionaj laboroj pri kvar diversaj temoj. Mi partoprenis en la laboroj de komisiono nr. II, kiu priiraktis "La eŭropan sekurecistemon kaj la kunlaboron en la regiono de la Balta Maro". Estis interese aŭdi pri kampanjoj faritaj kaj efektivitaj kunlabore de la ĉirkaŭbaltmaraj pacasocioj. Bedaŭrinde la diskutoj en tiu komisiono ne temis pri tro konkretaj temoj kaj pro tio mi faris paroladeton pridemandante konkretajn aktivecojn por la individuaj, "simplaj" homoj en tiuj ĉi landoj. Tiel mi ankaŭ havis okazon priskribi la agadon de la esperanto-movado ĝenerale kaj aparte de SEF. Mi scias, ke mia relative modesta kontribuo poste estis sufiĉe diskutata inter individuaj partoprenantoj.

Certe mem la lingva kaoso de la konferenco instigis al diskutoj pri solvoj de la lingva problemo. Ĉiuj skandinava lingvoj (inkluzive la finnan), la rusa kaj la germana lingvoj estis uzataj en tiu relative malgranda forumo. Do, ekz-e la finnoj kiuj sciis nur la finnan, aŭ la rusoj nur sciantaj sian

## Ĉina esperanta monata gazeto EL POPOLA ĈINIO

varbas abonantojn por 1976

Abonkotizoj: unujara abono 10.00 S. Kr.  
dujara abono 15.00 S. Kr.  
trijara abono 20.00 S. Kr.

Abonu ĉe loka peranto:

**Eldona Societo Esperanto**

Fack  
S-200 42 Malmö 7

**Esperanto-Skolan**

Barnhusgatan 8  
Stockholm

gepatran lingvon estis, kompreneble, sufiĉe izolitaj.

La konferenco mem ne alportis ion novan specife por SEF, sed estas ĉiam pozitive havi la eblecon menci, informadi, diskuti pri lingva problemo kaj pri esperanto kun iel elstaraj reprezentantoj de pluraj landoj. Cetere, porpaca laboro celanta normaligon, plifaciligon de la rilatoj kaj kontaktoj inter homoj en diversaj landoj kun malsamaj sociordoj estas nepara kondiĉo por la daŭra laboro de la esperanto-movado.

Tomas Jansson

## PRENUMERERA

FÖR 1976 PA

## ESPERANTO-TIDNINGAR

Heroldo	43:—
Kontakto	21:—
Oomoto	13:—
Sennaciulo	26:—
Kulturaj Kajeroj	18:—
Literatura Foiro	13:—

Ingen moms på dessa priser. UEA:s tidskrift "Esperanto" får man genom medlemskap i UEA och "La Espero" genom Svenska Esperanto-förbundet. Förlaget förmedlar abonnemang även på andra Esperantotidningar men kan inte ta ansvar för att dessa levereras.

## ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

## Neutraliteten och individen

UEA understryker sin neutralitet och pekar på vikten av att ta vara på den enskildes idéer, genom två av de resolutioner som antogs vid kongressen i Köpenhamn.

Eftersom neutraliteten redan står i UEA:s stadgar, kan det synas överflödigt att anta en resolution om den. Anledningen till att UEA ansåg sig behöva bekräfta neutraliteten är de rykten som sprits under senaste året att UEA:s nya styrelse skulle vara styrd av ensidiga politiska intressen, en kampanj med liknande inriktning som kampanjer mot UEA på 50-talet, men i mindre omfattning. Emellertid ser UEA tillräckligt allvarligt på saken för att skriva "UEA:s politiska neutralitet har alltid varit och kommer alltid att vara grundprincipen för dess internationella verksamhet."

I samma resolution räcker man ut en hand till samarbete med alla som vill arbeta för esperanto, och uppmanar sina egna organ att avstå från dispyter och personföljelser.

Individens roll i esperantorörelsen var ett av kongressens två huvudtema, och uttrycktes i en annan resolution: "De olika esperantoorganisationerna bör göra vad de kan för att de enskilda medlemmarna ska kunna delta aktivt i organisationernas planering och verksamhet." En väg ser man i att göra kongresser och konferenser till forum för de enskilda esperantisternas idéer, en annan väg är uppmaningen till esperantisterna att ställa sina krafter till förfogande för arbetet i organisationerna.

Ulla Luin



# RADIO

Aŭskultu la diversajn esperantajn radiodisaŭdigojn kaj **skribu al la stacioj**. Ne gravas, ĉu vi kritikis aŭ laŭdas la disaŭdigojn. La stacioj deziras unuavice nur konfirmon ke vi aŭskultas. Jen kelkaj el la stacioj "kapteblaj" en sudokcidenta Svedujo:

**Ĉiutage:** Varsovio, 200 m, 50,04, 48,9.

Horoj: 16.30—17.00, 22.30—23.00.

**Dimanĉe:** Romo, 41,24, 21.00—21.20.

Sofio, 20,05—20,30, 50,28 m.

(kelkfoje tre bone aŭdebla).

**Marde:** Vieno, 203 m, 18.35—18.45.

**Ĵaŭde:** Berno, 75,28, 22.45—22.55.

**Sabate:** Zagreb, 264 m, 00.05—00.20.

(Tre bone aŭdebla.)

En la internaciaj gazetoj vi trovos informojn pri pli da stacioj kaj elsendoj, kies aŭdeblecon en Svedujo ni tamen ne povas konfirmi. La adresoj estas "Radio..." kaj la nomo de la koncernaj lokoj. Aldonu: "Esperantofako".

# PENSOJ EN EKZILO

**La revivigita Universala Ligo regule eldonas siajn bultenojn. El ĝi ni ĉerpas la jenajn liniojn de la giganta pioniro de esperanto, 80-jara Andreo Cseh.**

En mia nuna ekzilo mi ricevis kelkfoje de amikoj vortojn konsolajn kaj kuraĝigajn. Jen ekzemple: "Kara samideano, vi devas kutimiĝi al via sorto, same kiel ĉevalo al la vipo."

Tre saĝa konsilo, inda al buŝo de vera filozofo! Tial de kelka tempo mi kutimas regule ekzerci la kutimiĝon laŭ la ritmoj de la matena gimnastiko en la radio.

Sed, ĉu mi bezonas novan kutimiĝon? Ĉu ne sufiĉis miaj kutimiĝoj dum la du mondmilitoj? Dum la unua mi devis kun miaj gepatroj rifuĝi el la hejmlando en malproksiman regionon pro la proksimiĝo de la malamikaj armeoj, kaj dum la dua mi devis min kaŝi pro la Hitlerana persekuto de Esperanto.

Kiam mi nun ririgardas al tiuj tempoj, mi rimarkas, ke ili portis al siaj viktimoj krom la multego da suferoj kaj perdoj hazarde ankaŭ kelkajn utilojn kaj bonaĵojn. Ekzemple, tiam fariĝis la kursmetodo, fondiĝis la Internacia Esperanto-Instituto, aperis La Praktiko. Dum la dua mondmilito ni fondis la Universalan Ligon kaj realigis la mondmonton.

# POLSKIE RADIO

## Warszawa

— 10-tagaj ekskursoj tra Pollando  
— valoraj objektaĵaj premioj

atendas la eksterlandajn geaŭskultantojn de la Pola Radio, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj de nia konkurso:

- 1) Kion vi opinias pri la rolo de la sindikatoj en la solvado de la aktualaj problemoj de la laborula mondo?
- 2) Kion vi scias pri la kreiĝo kaj agado de la Monda Federacio de la Sindikatoj?

- 3) Kiujn virinojn vi konas, kiuj — laŭ via opinio — ludis grandan rolon en la internacia vivo aŭ havas meritojn por via lando?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, Poŝtkesto 46, Polska — en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31 de decembro 1975 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncos en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31an de januaro 1976.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras bonŝancon en la lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

Granda bato trafis min, kiam la rumana polico forpelis min, ĉar en laborista festo mi parolis pri la idealoj de Zamenhof. Tiu ekzilo tamen fariĝis fine tre utila, ĉar tiam mi transiris en Genevon kaj komencis la vastan internacian laboron por Esperanto sub la saĝa kaj agrabla gvido de Edmond Privat.

Do, kutimiĝon al la sorto mi havas jam sufiĉan. Sed ankaŭ spertojn, ke tiu multe kritikata kaj riproĉata reganto de niaj vivoj estas tre kaprica, ofte petolema kaj afabla, kiu eble iam eĉ decidus mem kutimiĝi al siaj subuloj.

Dag Hammarskjöld, iama ĝenerala sekretario de la UNO, diris: "La sorto estas tia, kia ni mem ĝin faras."

Do ankaŭ ni faru la sorton de nia Universala Ligo kun persisto kaj fido!

Andreo Cseh

### Kompletigo

al la jubilea artikolo pri Andreo Cseh en nro 4/75 de La Espero: en la biografio mankis 1) la nomo de lia naskiĝloko: Marošludaŝ, tiutempe en Hungarujo, nuntempe Ludoŝul de Mureŝ en Rumanio. 2) Kaj la dato de lia Nederlanda civitanigo; 28-a de novembro 1939.

T. M.

Lasta dato por manuskriptoj por la sekvonta numero de La Espero: 10 jan. 1976.

# La disvastigo de Esperanto

Doktoro Zamenhof verkis interalie du poemojn: LA ESPERO kaj LA VOJO. En la unua li diris: "... kaj rapide kreskas la afero"; en la dua li diris: "... ni paŝon post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro."

En la unua poemo doktoro Zamenhof estas la idealisto; en la dua li estas la realisto.

Mi havas la saman sperton. Kiam mi komencis mian propagandan laboron mi tuŝis la idealisman flankon. La reago estis preskaŭ ĉiam la sama, nome:

a. la komplimento: "tre interesa",

b. la konsilo: "oni devus enkonduki Esperanton en la lernejon".

Pro tiu konsilo mi turnis min al la tiama skabeno por la instruado en Amsterdam, sinjoro De Miranda. Lia respondo estis: "La homoj ĉiam pensas ke skabeno povas agi laŭ propra plaĉo. Tio estas absoluta miskompreno. Mi povas proponi la enkondukon nur post kiam montriĝis ke Esperanto jam tiom enpenetris en la internacian vivon, ke la instruado estas necesa. Tiu maturigo ne estas mia tasko. Tiu laboro estas la via."

Similan respondon mi poste ricevis de la sekretario de la Ministerio pri instruado en Hago. Simile parolis la alta protektanto de la Universala Kongreso en Vieno, la tiama prezidanto de Aŭstrujo: "Vi fidu pli al propra forto."



En mia profesia laboro kiel turist-  
gvidisto kaj interpretisto mi havis la  
okazon aŭskulti la ĝeneralan opinion  
pri Esperanto de homoj el multaj lan-  
doj kaj preskaŭ ĉiuj tavoloj de la so-  
cio. La ĝenerala opinio estas favora al  
Esperanto. Principe oni estas preta  
subskribi la "promeson", kiun doktoro  
Zamenhof enmetis en la unuan libron  
kaj kiu tekstas jene:

"Mi, subskribinto, promesas eller-  
ni la proponitan de doktoro Esperanto  
lingvon internacian, se estos montrite  
ke dek milionoj da personoj donas  
publike tian saman promeson." Ni do  
vidas, ke doktoro Zamenhof jam  
montris al ni la vojon. Nia devizo do  
estu: NE PREDIKU, SED APLIKU.

Resume ni povas fari la jenan kon-  
kludon:

Esperanto troviĝas inter la du po-  
lusoj

a. **La registaroj**, kiuj povas oficiale  
rekoni kaj enkonduki Esperanton  
en la lernejon NUR POST KIAM  
sufiĉe da homoj estos lernintaj la  
lingvon,

b. **La homoj**, kiuj lernos Esperanton  
NUR POST KIAM la lingvo estos  
sufiĉe vaste aplikata en la interna-  
cia vivo.

Ni do turnu nin al la instancoj, kiuj  
okupas lokon sur ĉi tiu tereno, kun la  
peto: "Bonvolu menciĝi la komunikojn  
por la publiko, klientoj aŭ gastoj en  
Esperanto apud la kutimaj lingvoj."  
Ni povas menciĝi sufiĉe da instancoj,  
kiuj jam plenumas ĉi tiun geston de  
internacia ĝentileco.

Por detalaj informoj pri la sperto  
en tiu direkto dum la pasintaj 40 jar-  
oj restas je via dispono

**Hans Bakker**

Delegito de UEA,  
Amsterdam, Nederlando

## La hazardo ludas ofte rolon

En la jaro 1970 mi vizitis la univer-  
salan kongreson en Vieno. Unu tagon  
mi sidis en la Akceptejo, rigardante  
la gesamideanojn, kiuj svarmis tie.  
Zumis kiel en abelujo, kiam la geami-  
koj renkontis unu la alian. Estis gajaj  
rido, afablaj okuloj kaj senfina babilado,  
serĉe kaj serioze, vikle kaj in-  
terese kiel ĉiam, kiam geesperantistoj  
el ĉiuj partoj de la mondo kolektiĝas  
por ĝui la kunestadon dum internacia  
kongreso.

Ĉe tablo apud mi ekcidas du sinjo-  
rinoj. Estis nederlandanino kaj italino.  
Mi nun ne memoras kiel kaj kial ni tri  
komencis interparoli, sed estas ja tiel,  
ke esperantistoj neniam sentas sin  
fremduoj unu antaŭ la alia kaj facile  
komencas interparolon.

Mi eksciis, ke la nomo de la italino  
estis Maria Luisa Russo, instruistino  
en Napoli, kie ŝi ankaŭ intruas Es-  
peranton por ok knaboj. Profesorino

Russo estis tre entuziasma esperan-  
tistino, kaj ŝiaj lernantoj estis dili-  
gentaj studentoj.

La kongreso finiĝis, kaj mi revoja-  
ĝis kun la dana karavano al Uddeval-  
la. Trafoliumante la kongresajn pa-  
perojn kaj memorante interalie la ha-  
zardan renkontiĝon el la Akceptejo,  
min kaptis la penso, ke mi skribos le-  
teron al la eta esperantoklaso de s-ino  
Russo.

Pensite, farite.

Mi ricevis respondon de la profes-  
orino, kiu informas, ke la disĉiploj ha-  
vas grandan intereson pri Svedujo kaj  
volonte deziras ekscii ĉion pri nia nor-  
da lando, se la "urso" bonvolas priz-  
orgi la informadon.

La interkorespondado daŭriĝis Mi  
sendis poŝtkartojn, gazeteltondajojn,  
bildojn, fotojn ktp. Kaj fine antaŭ unu  
semajno, mi ricevis pere de la in-  
struistino kvar leterojn, skribitajn  
de ŝiaj lernantoj kaj krome salutojn  
de la aliaj, kiuj por tuttaga laboro  
dum la somero ne havis tempon por  
skribi leteron.

Ili sciigis min, ke ili en la klaso fa-  
ris afiŝojn, sur kiujn ili fiksis bildojn,  
kiuj rilatas Svedujon, kaj notas ĉion,  
kion mi rakontas, kaj informojn, kiujn  
ili trovas en italaj libroj pri Svedujo.

En Kopenhago mi denove renkontis  
profesorinon Russo, kiu kiel donacon  
de la esperantaj disĉiploj transdonis  
muzikantan tableton. Kaj mi donis  
svedan bildolibron, dalekarlian ligno-  
ĉevalon, skatolon kun sveda flago.  
Malgrandaj — sed mi kredas, ke la  
donacoj havas sufiĉe grandan signi-  
fon.

En lernejo en fora Napoli kelkaj  
knaboj troviĝas, kiuj dank' al ener-  
gia instruistino kaj pere de Esperanto  
ekhavis kreskantan intereson pri  
Svedujo kiel lando, pri la sveda popo-  
lo, nia agrikulturo kaj naturo, indu-  
strio, kultura kaj socia vivo, lerneja  
sistemo, politiko ktp. senfine.

La hazardo faris, ke kelkaj knaboj  
per Esperanto kaj energia, idealisma  
profesorino ekhavis larĝan scion pri  
lando, kiu ĝis nun estis blanka maku-  
lo por ili.

EDE.

**Visst  
har du råd  
att vara med  
i UEA!  
80 kr kostar det**

# GRON- LANDO

## Dana problemo

Somere la danaj gazetoj ĉiam aperig-  
as rakontojn pri Gronlando kaj ĝia  
popolo. Fakte oni povas miri pro tiu  
intereso pri arkta regiono dum la mo-  
natoj, kiam ĝi montras sian plej mil-  
dan vizaĝon. La arktan realecon oni  
renkontas nur dum la 8—9 monatoj,  
kiam ĝiaj kondiĉoj estas teruraj. En  
tiu periodo oni trovas popolon, kiu ob-  
stine daŭrigas sian vivon en naturo,  
kiu vidata per eŭropaj okuloj povas  
ŝajni preskaŭ netolerebla; sed tio, kio  
por eŭropano estas netolerebla por  
gronlandano estas provoko, kiun li al-  
frontas kun kuraĝo.

### Kolonipotenco

Oni devas esti singarda kaj ne tro  
alte taksi la referaĵojn de danoj,  
kiuj post laboro en Gronlando dum  
kelkaj jaroj kredas, ke ili jam trovis  
la ŝlosilon al la gronlanda realeco. Ili  
spertoj ja estas limigataj pro tradicia  
kolonipotenco — kvankam ĝi estas  
iom pli sofista ol aliaj — ĝi neniam  
trovis necese, ke la senditaj danoj estu  
kapablaj paroli la gronlandan lingvon.  
Oni sendas 9-jarajn gronlandajn in-  
fanojn al Danlando por tie frekventi  
lernejon, kaj jen oni konkludas, ke  
tio malgrandigas la lingvajn proble-  
mojn, sed tio estas sensecaĵo.

### Aroganta

Pri kies lingvaj problemoj oni pen-  
sas? Ĉu ne pri tiuj de la danoj?

La gronlandanoj ja ne kulpas, se  
danoj volas loĝi tie, kie ili ne kompre-  
nas la lingvon. Cetere oni erare ima-  
gas, ke la lingvaj malfacilaĵoj estas  
la kerno de la gronlanda problemaro.  
En Danlando ekzistas fatala nesicio  
pri la veraj kondiĉoj en Gronlando, oni  
montras arogantan sintenon, ĉar oni  
havas la ideon, ke Gronlando estas tek-  
nika afero, kies evoluo okazas laŭska-  
le, kaj kie oni atendu certan procen-  
ton da perdo same kiel en alia entre-  
prenado. Eĉ se la gastigfamilioj en Dan-  
lando bonintence akceptas gronlan-  
dajn infanojn, mi opinias, ke estas tre  
danĝere sendi ilin al Danlando. En  
Holsteinsborg oni dum jaroj faris tion,  
sed nun pli kaj pli da gepatroj feliĉe  
kontraŭas la ideon, ĉar ili ne volas, ke  
la infanoj fariĝu senradikaj en la  
fremda lando.

Do post kelkaj jaroj tiu praktiko



ĉesas rezulte de multaj amaraj spertoj.

### Malbone

Dum kvin jaroj mi faris socian laboron inter gronlandanoj en Danlando, kaj mi opinias, ke estas malbone sendi junajn gronlandanojn ĉtien por eduki ilin, ĉar dum la edukado oni povas motivigi ilin por resti kaj tiel eviti kroman aron da laboraspirantoj en Gronlando. Guste tio kaŭzis mian eldiron, ke la dana kolonipotenco estas pli sofista ol aliaj.

Gronlandanoj konsideras sin gronlandanoj nek pli nek malpli, kaj ĉiuj klopodoj por danigi ilin malsukcesis. La gronlanda naturo kaj la gronlanda kulturo postivis ĉiun atakojn dum jarcentoj. Nun oni serĉas la riĉaĵojn de nia naturo sen konsidero al nia popolo, — tio estas ankoraŭ pruvo pri la manko de respekto, kun kiu la okcidentaj kulturacioj agas kontraŭ iuj senindustriaj landoj.

### Senrespekto

Multaj spertuloj ĉesis pledi por la gronlanda popolo.

Niaj du landoj estas interligitaj nur per konstituciaj leĝoj, kaj tio postulas de la dana popolo respekton kaj akcepton de la gronlandanoj kiel popolo diferenca al la dana. Se oni en Danlando volas akcepti tion, niaj du popoloj povas interrilati sen devigi la gronlandanojn lerni fremdan lingvon por ke la aliaj povu kompreni ilin.

**Argaluk Lyngø**  
(Resume tradukita  
de Jenny Nielsen)  
(El Eŝo, Danlando)

### KIU KOMPONIS LA MUZIKON AL "LA ESPERO"

Dum la 1-a Univ. Kongreso en 1905 estis proponataj du himnoj: tiu de Cl. Adelsköld, ano de la Akademio de Sciencoj en Stokholmo (dediĉita al la Packongreso en Romo en 1891) kaj tiu de la franca barono F. de Ménéil, konsulo kaj muzikisto. La vigla, veka muzikaĵo (kvazaŭ meza inter la Marseljezo kaj Internacio) akiris plej grandan popularecon k. tiel do tradicie la muziko de Ménéil iĝis la oficiala himno de la Esp-istaro.

T. M.

### LERNU PER LA ERAROJ

"Membrolisto por (?) Grupo Esp." estas malĝusta esprimo. Laŭ PIV "listo" signifas: serio da nomoj de personoj. Ekz. Mi forstrekis lin el la listo de miaj amikoj. Listo de la vinoj proponataj en restoracio. Do la ĝusta esprimo estas "Membrolisto de (!) la Grupo Esp."

T. M.

## KLIPP UR PRESSEN

**Klippen om esperanto under september—oktober** handlar till stor del om Tonkins snabbvisit i Sverige. Tidningen Lands artikel om Anna Alamo-Sandgren (ett uppslag med färgbilder) är väl det bästa reportaget för de här två månaderna.

Klipplådan består av klipp som skickas till Esperantoförbundet (Fack, 122 04 Stockholm-Enskede) av klubbar och medlemmar. Ulla Luin har valt ut dragen ur klippen:

### Bohuslänningen

#### BETYDLIGT LÄTTARE LÄRA ESPERANTO ÄN ENGELSKA

Sven Olsson är cirkelledare för en fortsättningskurs i esperanto. Sju anställda på Berol (Stenungsund) deltar i 20-timmarskursen, som går i ABF:s regi. Man startar direkt efter arbetet en gång i veckan och håller till i företagets konferensrum. Således åtta tappra esperantister på Berol. Sven Olsson tycker att rörelsen negligeras i massmedia. (...)

Fackklubben har enats om en motion som vi sänder till fabriksarbetarnas kongress i maj nästa år. Vi önskar att samtliga fackföreningsmedlemmar skall informeras om de italienska socialdemokraternas förslag samt att information sprids inom LO om esperanto och dess organisationer, avslutar Sven Olsson.

26 sept. 1975

### Kungälvsposten

#### ESPERANTOORDF. VANN POLEN- RESA AV POLENS RADIO

Ordf. i Kungälv's esperantoklubb, fru Märtha Andréasson, packar väskorna om några dagar för att flyga till Warszawa. Det är ingen vanlig turistresa, eftersom polska radion står som värd. Anledningen är att hon vunnit första pris i en pristävling för "utlandssynare".

Nr 36, 1975

### Land

#### HÄR KOMMER ANNA — RESANDE I ESPERANTO

En 67-årig tant som håller föredrag. Utsänd från Kristliga esperantoförbundet. Nej, den kvällen kan man nog hålla sig för skratt, sade en av styrelseledamöterna. Hans förening skulle få besök av Anna Alamo-Sandgren. — Men när Anna hade stått i talarstolen i tio minuter, då skrattade den skeptiske styrelse-gubben hjärtligt. (...)

Anna har arbetat för Kristliga esperantoförbundet i närmare 30 år. För dess räkning har hon rest i 25 länder, hon har besökt 1.100 orter i Sverige, hållit 5.000 föredrag. Efter allt detta händer det då och då att hon får en förvånad fråga: Esperanto: finns det fortfarande?

Nr 42, 17 okt. 1975

### Expressen

#### VÄRLDSENKELT

Den kritstrecksrandade mannen i soffhörnan hette Humphrey Tonkin och var amerikan. Amerikanska förstär jag riktigt hyfsat, men mannen talade till mig via tolk. (...)

Esperanto i all ära, men vad är det för fel på engelskan som redan så många talar?

— En av tio kan engelska, två av tio kan kinesiska. Och många länder vägrar att acceptera engelskan som det veder-tagna världsspråket.

16 okt. 1975

(Forts. sid. 55)

## UEA i arbete

### Arbetsgrupperna tänker jobba i år

De mest intressanta besluten i UEA:s representantskap (komitato), som sammanträdde i Köpenhamn, finns i bilagorna till protokollet. Bilagorna är förlagda till verksamhet i de ständiga utskotten, eller arbetsgrupperna.

### FN, riksdag

En arbetsgrupp, Komisiono pri eksteraj rilatoj, arbetar med kontakter på det officiella planet.

En speciell grupp (i Paris) arbetar med kontakter med Unesco, och ett resultat av dess arbete är hälsningen till kongressen från Unescos generaldirektör, Amadou-Mahtar M'Bow.

En liknande arbetsgrupp planeras för kontakter med FN som helhet.

En annan grupp planeras för kontakter med och informationer till olika länders riksdagar, i samarbete med ländernas esperantoorganisationer.

### Uländer

De flesta uländer saknar fungerande esperantoorganisationer. En arbetsgrupp, Komisiono pri landa agado, har bl. a. till uppgift att hålla kontakt med de organisationer eller enskilda medlemmar som är beredda att göra något, och att hjälpa dem så långt möjligt med råd och material.

